Asocia Statuto de la Monda Organizo por Disvolvado de la Esperantista Ekonomio

Ĉapitro I - Pri la nomo, esenco, sidejo, celoj kaj daŭro

Art. 1-a - Monda Organizo por Disvolvado de la Esperantista Ekonomio, fondita la 12-an de Aprilo 2008, estas jura persono je privata juro, neprofitcela, je nedifinita daŭro, kun sidejo en kaj sub la jurisdikcio de Braziljo, Brazilo, regata de ĉi tiu Statuto kaj ĝeneralaj dispozicioj de la Brazila Leĝaro aplikeblaj al ĝi kiel "OSCIP" (organizaĵo de la civila socio kun publika intereso).

Sola paragrafo - Monda Organizo por Disvolvado de la Esperantista Ekonomio povos esti simple nomata, en ĉi tiu Statuto kaj en oficialaj dokumentoj, kiel INTRAESPO MUNDIAL (MONDA INTRAESPO).

Art. 2-a - Konforme al la Artikolo 3-a de la Brazila Federacia Leĝo 9.790/99, MONDA INTRAESPO havas kiel celojn:

I - Diskonigi la brazilan kulturon eksterbrazile kaj la diversajn naciajn kulturojn en Brazilo;

II - Disvolvi kaj instigi, tutmonde kaj loke, la esperantistan ekonomion celante dungadon, enspezigon kaj afer-okazojn al esperanto-parolantoj kaj la inkluzivon de entreprenoj adoptintaj la internacian lingvon Esperanto kiel laborlingvon en la tutmonda ekonomio;

III - Agadi por la starigo de registaraj politikoj, kiuj subtenu la plivastigon de la esperantista ekonomio, en Brazilo kaj en la mondo.

§ 1-a - Oni difinas esperantistan ekonomion kiel la aron de ĉiuj ekonomiaj aktivaĵoj en kiuj la internacia lingvo Esperanto ĉu rekte, ĉu nerekte, rolas kiel laborlingvo.

§ 2-a - Inter aliaj, la merkato-branĉoj sube listigitaj ligiĝas al kelkaj el la aktivaĵoj de la esperantista ekonomio:

I – La instruado de la internacia lingvo Esperanto;

II – La instruado de fremdaj lingvoj, kun Esperanto kiel propedeŭtika lingvo;

III – La tradukado de la internacia lingvo Esperanto al etnolingvo kaj de etnolingvo al la internacia lingvo Esperanto;

IV – La internacia komercado;

V – La eldonindustrio;

VI – La aŭdvida produktado;

VII – La distanca edukado kaj instruado;

VIII – La amuzindustrio;

IX – La turismo-industrio;

X – La organizado de ĉiaspecaj eventoj;

XI – La produktado de memorigaĵoj kaj varoj ligitaj al la esperantista kulturo;

XII – La produktado de komputilaj programoj por tutmonda uzado;

XIII – La amaskomunikiloj, inkluzive de la reta gazetaro;

XIV – La lanĉo kaj administrado de esperantistaj markoj;

XV – Ĉiaspecaj servoj por internacia interŝanĝo;

XVI – La servoj en la fako de informteknologio;

XVII – La servoj de kultura produktado;

XVIII – La servoj de entreprena konsultado kaj asistado;

XIX – La servoj de loĝistiko, transportado kaj distribuado;

XX – La servoj liverataj de liberalaj profesiuloj;
XXI – La servoj de komerca perado kaj reprezentado;
XXII – Kiu ajn alia branĉo, en la sfero de komerco, servoj, industrio aŭ produktado kaj prilaborado de nutraĵoj.

Art. 3-a – MONDA INTRAESPO ne distribuas inter siaj membroj, konsilantoj, komitatanoj, oficistoj aŭ donacintoj eventualajn profitojn, netajn aŭ malnetajn, dividendojn, bonusojn aŭ partojn de sia posedaĵo akiritajn en la plenumado de asociaj aktivaĵoj kaj ilin plene aplikas al la atingo de siaj asociaj celoj, laŭ la sola paragrafo de la Artikolo 1-a, Leĝo 9.790/99.

Art. 4-a – MONDA INTRAESPO realigos siajn aktivaĵojn laŭ la principoj de Ekonomia Esperantismo, entreprenisma movado por disvolvado de la esperantista ekonomio kaj plenumado de la jarmilaj celoj proponitaj de Unuiĝintaj Nacioj.

Art. 5-a – Dum la plenumado de siaj aktivaĵoj, MONDA INTRAESPO observos la principojn de laŭleĝeco, senpersoneco, moraleco, publikeco, efektiveco kaj efikeco kaj neniel diskriminacios laŭ raso, haŭtkoloro, sekso aŭ religio, laŭ la ero I, Artikolo 4-a, Leĝo 9.790/99.
Sola Paragrafo – Por plenumi sian celon, la Organizo agados per la rekta efektivigo de projektoj kaj programoj por disvolvado de la esperantista ekonomio, farado de loĝistikaj kaj konsultadaj servoj, por siaj membroj kaj privataj entreprenoj en kiuj ili partoprenas, kaj de peradaj servoj por subteni al siaj samspecaj aŭ samkarakteraj neprofitcelaj organizaĵoj kaj publikaj instancoj de samcelaj fakoj, laŭ la sola paragrafo de la Artikolo 3-a, Leĝo 9.790/99.

Art. 6-a – MONDA INTRAESPO regos sian funkciadon laŭ Normaj Ordonoj, ellaboritaj de la Ĝenerala Asembleo aŭ de la Administra Komitato, kaj Plenumaj Ordonoj, ellaboritaj de la Administra Komitato.

Art. 7-a – MONDA INTRAESPO disvolvos sistemon de asocia licenco por antaŭenigi sian plivastiĝon en Brazilo kaj tra la mondo.
§ 1-a – La sistemo de asocia licenco devos kongrui kun ĉi tiu Statuto kaj estos reguligata de kontrakto pri licenco, laŭ la Leĝo 8.955/94.
§ 2-a – La starigo de licencitaj unuoj en iu lando ne malebligos la kreadon de propraj filioj de MONDA INTRAESPO en la sama lando.

Ĉapitro II - Pri la aktivaĵoj de SIDEE

Art. 8-a – La reto konsistanta el la centra oficejo de MONDA INTRAESPO, ĝiaj propraj oficejoj kaj la aro de ĉiuj licencitaj organizaĵoj, en Brazilo kaj tra la mondo, nomiĝos Sistemo Internacia por Disvolvado de la Esperantista Ekonomio/SIDEE.

Art. 9-a – SIDEE disvolvos la jenajn aktivaĵojn:
I – Organizi programojn kaj projektojn por disvolvado de la esperantista ekonomio, kunlabore kun neregistaraj organizaĵoj samspecaj aŭ samcelaj, registaraj instancoj en ĉiuj niveloj kaj internaciaj organizaĵoj;
II – Evoluigi programojn por Disvolviĝo Loka de la Esperantista Ekonomio - DLEE, konforme al la metodikaj principoj de Disvolviĝo Loka Integra kaj Daŭripova (DLID), kunlabore kun lokaj, provincaj aŭ naciaj registaroj;
III – Agadi ĉe naciaj kaj internaciaj organizaĵoj ligitaj al komerco, ekonomia disvolvado kaj laboro, kun la celo plifortigi la esperantistan ekonomion kadre de la

agadkampo de tiuj organizaĵoj;

IV – Agadi ĉe komercistaj asocioj, korporacioj de vendejestroj, entreprenistaj sindikatoj kaj similaj insititucioj, en Brazilo kaj tra la mondo, kun la celo atingi la aliĝon aŭ subtenon de la entreprenistaro al la disvolvado de la esperantista ekonomio;

V – Krei, partnere kun plenrajta institucio, laŭ la Leĝo 6.385/76, Nemoveblaĵan Fonduson kun la celo akiri aŭ starigi ĉiajn komercajn nemoveblaĵojn utiligeblajn de SIDEE, laŭ propra regularo de la Fonduso;

VI – Realigi klerigajn kampanjojn pri la esenco, la brancoj kaj la avantaĝoj de la esperantista ekonomio kaj pri la principoj de la Ekonomia Esperantismo;

VII – Realigi seminariojn kaj prelegojn pri demandoj ligitaj al la tutmonda komerco, laŭ la perspektivo de konstruado de nova tutmonda ekonomia ordo;

VIII – Realigi prelegojn, simpoziojn, kursojn, foirojn kaj ekspoziciojn ligitajn al la antaŭenigo de eksporto-kulturo kadre de la esperantista internacia komerco;

IX – Antaŭenigi la esperantistan kulturon, tiom la efektive transnacian kaj propran al la monda esperantista komunumo, kiom la esperantistan kulturon ligitan al la naciaj kulturoj, laŭ la perspektivo de kultura ekonomio;

X – Organizi programojn de komerca interŝanĝo, inkluzive de afer-renkontiĝoj inter entreprenoj de la esperantista ekonomio de la tuta mondo;

XI – Gvidi la integriĝon de la komunumo de aliĝintoj al SIDEE, kio ebligu la estigon de novaj laborfrontoj, projektoj kaj diversaj programoj ligitaj al la kompleta disvolvado de la esperantista ekonomio kaj al la plena prospero de entreprenoj kaj profesiuloj de la esperantista ekonomio;

XII – Ellabori kaj realigi projektojn por la antaŭenigo de specifaj brancoj de la esperantista ekonomio, partnere kun privataj entreprenoj ligitaj al la membroj de MONDA INTRAESPO;

XIII – Ebligi virtualajn rimedojn por komunikado, interŝanĝo kaj entreprena negocado inter siaj membroj tra la mondo, tiel ke plifaciliĝu inter ili la konkretiĝo de negocoj kaj la disvolviĝo de ties entreprenoj.

Ĉapitro III - Pri la membroj

Art. 10-a – MONDA INTRAESPO konsistas el nelimigita nombro de membroj, laŭ la jenaj kategorioj:

I – FONDINTO: membro partopreninta la ĝeneralan fond-asembleon de MONDA INTRAESPO, kondiĉe ke tiu troviĝu ankaŭ en unu el la sekvaj kategorioj;

II – ENTREPRENISTO: membro kun partnera partopreno en kia ajn entrepreno;

III – KADRULO: membro, dungita de privata entrepreno, plenumanta estran rolon;

IV – MEMSTARULO: membro, kiu ne estante ligita al formala entrepreno, estas komerca reprezentanto, servo-plenumanto, vendisto, manartisto, memstara entreprenanto aŭ kun similaj aktivaĵoj;

V – LIBERALA PROFESIULO: membro, kiu praktikas liberalan profesion;

VI – KONSULTISTO: membro, kiu asistas en kiu ajn brancо de la merkato;

VII – INSTRUISTO: membro, kiu instruas la internacian lingvon Esperanto, nepre kvalifikita, prefere kun atesto pri kapablo aljuĝita de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj – ILEI – aŭ samspecaj institucioj, kaj profesie dediĉas sin al la instruado de la internacia lingvo Esperanto, memstare aŭ entreprene;

VIII – TRADUKISTO: membro, kiu estas tradukisto kaj uzas la internacian lingvon Esperanto kiel unu el siaj laborlingvojn.

§ 1-a – Ĉiuj membroj klopodos por adopti la internacian lingvon Esperanton kiel laborlingvon, strebante al plena posedo de la lingvo.

§ 2-a – MONDA INTRAESPO nur povos havi membrojn en Braziljo, Brazilo kaj en la urboj, kie ĝi havas propran oficejon;

§ 3-a – La membroj de la licencitaj oficejoj havos plenan aliron al ĉiuj servoj disponigitaj de SIDEE, sed la rajtoj kaj devoj rilataj al MONDA INTRAESPO - kiel partopreno en ĝeneralaj asembleoj, elekti kaj elektiĝi, i.a. - estos tiuj difinitaj de la statuto de la propra licencita organizaĵo, tra kiu la membro ligiĝis al SIDEE, laŭ difinoj en la licenco-kontrakto subskribita inter la centra oficejo de MONDA INTRAESPO kaj la licencitaj lokaj organizaĵoj;

§ 4-a – La akcepto kaj eksigo de membroj de MONDA INTRAESPO, inkluzive de la propraj oficejoj, koncernas la propran MONDAN INTRAESPON, dum la akcepto kaj eksigo de membroj ligitaj al la licencitaj organizaĵoj koncernas la respektivajn licencitajn organizaĵojn.

Art. 11-a – Rajtas la membroj kvitaj kun la asociaj devoj:

I – Elekti kaj elektiĝi al postenoj;

II – Partopreni la Ĝeneralajn Asembleojn;

III – Uzi la bazajn servojn kreitajn laŭ la validaj Normaj kaj Plenumaj Ordonoj;

IV – Kontrakti aldonajn servojn laŭ specialaj kondiĉoj, laŭ la validaj Normaj kaj Plenumaj Ordonoj.

Art. 12-a – Devas la membroj:

I – Plenumi la statutajn, regularajn, normajn kaj plenumajn dispoziciojn;

II – Akcepti la decidojn de la Ĝenerala Asembleo, de la Administra Komitato kaj de la Revizia Konsilantaro, laŭ la respektivaj respondecoj.

Art. 13-a – La membroj ne respondas solidare al la ŝuldoj de MONDA INTRAESPO.

ĈAPITRO IV - PRI LA KORESPONDANTOJ

Art. 14-a – MONDA INTRAESPO povos havi korespondantajn kunlaborantojn en kiu ajn urbo de Brazilo kaj de la mondo, kie ĝi ne havas propran oficejon, kun unu el la jenaj celoj:

I – Labori por la fondiĝo de loka neregistara organizaĵo, kiu povos poste subskribi licenco-kontrakton kun MONDA INTRAESPO, laŭ la kondiĉo, ke tiu organizaĵo havu la postulatan karakteron kaj plenumu ĉiujn kondiĉojn por ke ĝi fariĝu licencita organizaĵo;

II – Kunlabori kun la starigo de propra oficejo de MONDA INTRAESPO en la respektiva urbo, ĉefe per loĝistika subteno kaj lokaj kontaktoj.

ĈAPITRO V - PRI LA ORGANIZA STRUKTURO, RESPONDECOJ KAJ TASKOJ

Art. 15-a – MONDA INTRAESPO havas la jenan organizan strukturon:

I – Ĝenerala Asembleo;

II – Administra Komitato;

III – Revizia Konsilantaro;

IV – Fakaj Nukleoj.

Sola Paragrafo – La Organizo ne pagas salajron, sub kiu ajn formo, al postenoj de la Administra Komitato kaj de la Revizia Konsilantaro, kies agado estas tute senpaga.

Art. 16-a – MONDA INTRAESPO praktikos administran mastrumadon necese kaj sufiĉe por eviti, al individuoj kaj al grupoj, la ekhavon de personaj avantaĝoj rezultantaj de la partopreno en decido-procezoj, laŭ la ero II, Artikolo 4-a, Leĝo

9.790/99.

SEKCIO I – PRI LA ĜENERALA ASEMBLEO

Art. 17-a – La Ĝenerala Asembleo, supera organo de MONDA INTRAESPO, konsistas el ties membroj ĝuantaj la statutajn kaj regularajn rajtojn.

Art. 18-a – Koncernas la Ĝeneralan Asembleon:
I – Elekti kaj malelekti la Administran Komitaton kaj la Revizian Konsilantaron;
II – Pridiskuti reformojn de ĉi tiu Statuto;
III – Pridiskuti la ellaboron kaj aprobon de sia propra Interna Regularo;
IV – Pridiskuti la malfondon de MONDA INTRAESPO;
V – Pridiskuti la oportunecon forvendi, cedi, hipoteki aŭ interŝanĝi asociajn posedaĵojn;
VI – Ellabori Normajn Ordonojn.

Art. 19-a – La Ĝenerala Asembleo ordinare okazos ĉiujare, por:
I – Aprobi la proponon de jara programo de MONDA INTRAESPO, prezentita de la Administra Komitato;
II – Analizi la jarraporton de la Administra Komitato;
III – Analizi kaj aprobi la raporton de la Administra Komitato, laŭ la rekomendo de la Revizia Konsilantaro;
IV – Elekti la Administran Komitaton kaj la Revizian Konsilantaron.

Art. 20-a – Ĝenerala Asembleo eksterordinare okazos laŭ alvoko:
I – De la Administra Komitato;
II – De la Revizia Konsilantaro;
III – Per peticio subskribita de minimume kvinono de la membroj, kvitaj kun siaj asociaj devoj.

Art. 21-a – La kunvoko de la Ĝenerala Asembleo okazos per specifa alvoko afiŝita en la oficejo de MONDA INTRAESPO kaj, se eble, en loka gazeto kun granda eldono aŭ per aliaj konvenaj rimedoj, inkluzive de elektronikaj medioj kiel Interreto, aŭ eletronikaj mesaĝoj senditaj al la membraro, minimume 30 tagojn antaŭe.
§ 1-a – Ĝeneralaj Asembleoj instaliĝas je la difinita horo kun la ĉeesto de la absoluta plimulto de la membraro, aŭ tridek minutojn post la difinita horo, kun ajna nombro de ĉeestantaj membroj.
§ 2-a – La membro rajtos reprezentiĝi de prokuranto, nomumita por specifa Asembleo kaj pere de rajtiga akto notarie agnoskita.

SEKCIO II – PRI LA ADMINISTRA KOMITATO

Art. 22-a – La Administra Komitato konsistos el unu Prezidanta Direktoro, unu Administra Direktoro, unu Financa Direktoro, unu Direktoro por Eksteraj Rilatoj kaj unu Ĝenerala Sekretario.
§ 1-a – La mandato de la Administra Komitato daŭros 3 jarojn, kun la ebleco de unu sekva reelektiĝo.
§ 2-a - La mandato de la Administra Komitato komenciĝas ĉiam en la komenco de la civila jaro.
§ 3-a – Posteno de Administra Komitatano vakos post tri sinsekvaj malĉeestoj, aŭ kvin alternaj, en ordinaraj kunsidoj de la Administra Komitato, sen skriba pravigo.

Art. 23-a – La Administra Komitato respondecas pri:

I – Ellabori kaj submeti al la Ĝenerala Asembleo proponon por la jarprogramo de MONDA INTRAESPO;

II – Plenumi la jarprogramon de aktivaĵoj de MONDA INTRAESPO;

III – Ellabori kaj prezenti al la Ĝenerala Asembleo jarraporton pri la aktivaĵoj de MONDA INTRAESPO;

IV – Krei, kun publikaj kaj privataj institucioj, kontraktojn pri reciproka kunlaborado en aktivaĵoj de komuna intereso;

V – Antaŭenigi la plivastiĝon de SIDEE laŭ ĉiuj eblaj rimedoj, emfazante la pligrandiĝon de la reto de licencitaj organizaĵoj;

VI – Dungi kaj maldungi oficistojn;

VII – Ellabori Normajn kaj Plenumajn Ordonojn por reguligi la organizadon kaj internan funkciadon de MONDA INTRAESPO kaj de ties organoj;

VIII – Subskribi kontraktojn, interkonsentojn kaj partneriĝojn.

Art. 24-a – La Administra Komitato kunsidos almenaŭ unu fojon monate, eĉ se virtuale, per telekonferenco aŭ aliaj rimedoj ebligitaj de la informteknologio.

Art. 25-a – Estas taskoj de la Prezidanta Direktoro:

I – Reprezenti MONDAN INTRAESPON, aktive, pasive, jure kaj eksterjure;

II – Plenumi kaj plenumigi tiun ĉi Statuton, la Internajn Regularojn, la validajn Normajn kaj Plenumajn Ordonojn;

III – Prezidi la Ĝeneralan Asembleon;

IV – Kunvoki kaj prezidi la kunsidojn de la Administra Komitato;

V – Plenumi la superan administradon de MONDA INTRAESPO.

Art. 26-a – Estas taskoj de la Administra Direktoro:

I – Ĝenerale kunlabori kun la Prezidanta Direktoro;

II – Ellabori kaj plenumigi la administrajn gvidliniojn de MONDA INTRAESPO;

III – Subkribi, kun la Prezidanta Direktoro, la administrajn dokumentojn de MONDA INTRAESPO.

Art. 27-a – Estas taskoj de la Financa Direktoro:

I – Anstataŭi la Prezidantan Direktoron dum ties malĉeestoj kaj neeblecoj;

II – Transpreni la postenon de Prezidanta Direktoro, en vakaj okazoj, ĝis la fino de la mandato;

III – Kolekti kaj kontadi la membrokotizojn, enspezojn, kontribuojn kaj donacojn, konservante aktuala la librotenadon de MONDA INTRAESPO;

IV – Fari laŭdevajn pagojn nome de MONDA INTRAESPO, kun la konsento de la Prezidanta Direktoro;

V – Prezenti librotenajn raportojn, kiam petate;

VI – Prezenti al la Revizia Konsilantaro la kontolibrojn de MONDA INTRAESPO, inkluzive de raportoj pri la financa kaj kontada stato, kaj pri la evoluo de la organizaj posedaĵoj;

VII – Teni sub sia zorgo kaj respondeco la dokumentojn rilatajn al la kaso kaj la librotenado de MONDA INTRAESPO;

VIII – Konservi ĉiujn monrimedojn en financa institucio, krom tiujn por malgrandaj elspezoj, laŭ specifa Norma Ordono, kaj kiuj devos esti sub lia zorgo;

IX – Subskribi, kun la Prezidanta Direktoro, pagmandatojn kaj ceterajn financajn dokumentojn.

Art. 28-a – Estas taskoj de la Direktoro pri Internaciaj Rilatoj:

I – Ellabori politikojn por la inkluzivigo de la entreprenoj de la esperantista ekonomio en la mondan ekonomion;

II – Asisti la Prezidantan Direktoron pri aferoj de internacia kunlaboro;

III – Kunordigi, gvidi kaj subteni la partoprenon de MONDA INTRAESPO kaj de kunligitaj institucioj en internaciaj organizaĵoj, retoj, forumoj kaj eventoj, kiuj temas pri demandoj rilataj al la tutmondigo de la ekonomio kaj de la kulturo;

IV – Gvidi, antaŭenigi kaj kunordigi la planadon, formuladon, efektivigon kaj taksadon de politikoj, programoj kaj internaciaj projektoj de SIDEE;

V – Ellabori strategiojn kaj subteni agadojn por pliintensigo de la kultura kaj arta interŝanĝo inter Brazilo kaj aliaj landoj, harmonie kun la licencitaj organizaĵoj kaj samspecaj institucioj;

VI – Plani, gvidi, kunordigi kaj instigi la partoprenon de membroj de SIDEE en internaciaj eventoj ligitaj al la kulturo aŭ al la ekonomio.

Art. 29-a – Estas taskoj de la Ĝenerala Sekretario:

I – Agi kiel sekretario en la kunsidoj de la Administra Komitato kaj de la Ĝenerala Asembleo, redakti kaj registri la respektivajn protokolojn;

II – Kunordigi la normigajn, sistemigajn, publikigajn kaj arkivajn laborojn de la administraj dokumentoj, de la Normaj Ordonoj kaj Plenumaj Ordonoj de MONDA INTRAESPO;

III – Helpi la Administran Komitaton determini operaciajn kaj administrajn rutinojn de MONDA INTRAESPO;

IV – Subskribi, kun la Prezidanta Direktoro, la administrajn dokumentojn de MONDA INTRAESPO, kiam tio maleblos al la Administra Direktoro;

V – Subskribi, kun la Prezidanta Direktoro, pagmandatojn kaj ceterajn financajn dokumentojn, kiam tio maleblos al la Financa Direktoro.

SEKCIO III – PRI LA REVIZIA KONSILANTARO

Art. 30-a – La Revizia Konsilantaro konsistos el tri membroj, unu ĉefanstataŭanto kaj unu anstataŭanto, elektitaj de la Ĝenerala Asembleo.

§ 1° – La Revizia Komitato ordinare kunsidos en la monatoj Marto, Junio, Septembro kaj Decembro de ĉiu jaro kaj eksterordinare kunsidos kiam necese, en virtuala aŭ ĉeesta kunsido.

§ 2° – Kiam maleblos la ĉeesto de Revizia Konsilanto en ĉeesta kunsido, tiu rajtos virtuale partopreni, laŭ telekonferenca sistemo, kondiĉe ke la analizotaj dokumentoj estis jam senditaj al ties taksado.

Art. 31-a – La mandato de la Revizia Konsilantaro koincidos kun la mandato de la Administra Komitato.

§ 1° – En la okazoj de vakanta posteno de membro, ties mandaton kompletigos la sekva anstataŭanto.

§ 2° – Vakos la posteno de tiu Revizia Konsilanto, kiu sen skriba pravigo malĉeestos en tri sinsekvaj, aŭ kvin alternaj, ordinaraj kunsidoj de la Revizia Konsilantaro.

Art. 32-a – Estas taskoj de la Revizia Konsilantaro:

I – Kontroli la kontolibrojn de MONDA INTRAESPO;

II – Opinii pri bilancoj kaj raportoj pri la financa kaj kontada stato kaj pri la faritaj posedaĵaj operacioj, ellaborante opiniojn por la Ĝenerala Asembleo, laŭ la ero III, Artikolo 4-a, Leĝo 9.790/99;

III – Peti de la Administra Komitato, en kiu ajn momento, dokumentojn, kiuj pruvas la financajn kaj ekonomiajn operaciojn de MONDA INTRAESPO;

IV – Kiam necese, elekti kaj indiki al MONDA INTRAESPO la servojn de eksteraj sendependaj reviziantoj, kaj sekvi iliajn laborojn;

V – Eksterordinare kunvoki la Ĝeneralan Asembleon, laŭ la statutaj kaj regularaj dispozicioj.

SEKCIO IV – PRI LA FAKAJ NUKLEOJ

Art. 33-a – Fakaj nukleoj estas laborgrupoj ligitaj al difinita brancxo de la esperantista ekonomio.

Art. 34-a – La starigo de faka nukleo okazos per specifa Norma Ordono, kiu priskribos la gxeneralajn aspektojn de gxia organizado, celoj kaj gxeneralaj aspektoj de funkciado, respektataj la statutaj kaj regularaj dispozicioj de MONDA INTRAESPO.

ĈAPITRO VI – PRI LA FINANCAJ RIMEDOJ KAJ KALKULRAPORTADO

SEKCIO I – PRI LA FINANCAJ RIMEDOJ

Art. 35-a – La financaj rimedoj necesaj al la efektivigo kaj plivastigo de aktivaĵoj de MONDA INTRAESPO povos fonti el:

I – Partneriĝaj interkonsentoj kaj kontraktoj kun registaraj instancoj por la financado de projektoj kaj programoj en la agadkampoj de la Organizo;

II – Kontraktoj kaj interkonsentoj kun naciaj kaj internaciaj entreprenoj kaj agentejoj;

III – Donacoj, stipendioj, postlasaĵoj kaj heredaĵoj;

IV – Rentoj de la investado de financaj aktivoj kaj aliaj posedaĵoj de la Organizo;

V – Unufoja aliĝkotizo al la Organizo kaj membrokotizoj, laŭ decido de la Administra Komitato;

VI – Enspezoj, kiuj fontas el la sistemo de asociaj licencoj;

VII – Farado de ĉiaspecaj servoj al la membroj, al iliaj respektivaj entreprenoj kaj al aliaj interesatoj, kiuj volas ricevi servojn ligitajn al la esperantista ekonomio;

VIII – Okazigo de kursoj, foiroj, simpozioj, ekspozicioj, kongresoj i.a., per propraj skipoj aŭ kontraktitaj por tiu celo, ankaŭ kun la rajto licenci markojn de eventoj sub la nomo de MONDA INTRAESPO;

IX – Eldonado de komercaj gvidlibroj kaj katalogoj;

X – Aliaj laŭleĝaj enspezoj, ene de la eblecoj de la t.n. "OSCIP" (organizaĵoj de la civila socio kun publika intereso).

Art. 36-a – La posedaĵo de MONDA INTRAESPO konsistos el rajtoj, moveblaĵoj, nemoveblaĵoj, veturiloj, gregoj, akcioj kaj obligacioj.

Art. 37-a – En okazo de la malfondo de MONDA INTRAESPO, ties neta posedaĵo transdoniĝos al alia jura persono difinita laŭ la ero IV, Artikolo 4-a, Leĝo 9.790/99, prefere al unu kun la samaj asociaj celoj.

Art. 38-a – En la okazo, ke MONDA INTRAESPO ekhavis kaj poste perdis la kvalifikojn difinitajn de la Leĝo 9.790/99, la posedaĵo, tiam ekzistanta, akirita per publikaj rimedoj dum la periodo kiam validis la kvalifiko, estos kalkulita kaj transdonita al alia jura persono kvalifikita laŭ la samaj kondiĉoj de tiu Leĝo, prefere al unu kun la samaj asociaj celoj, laŭ la ero V, Artikolo 4-a, Leĝo 9.790/99.

SEKCIO II – PRI LA KALKULRAPORTADO

Art. 39-a – La kalkulportado de MONDA INTRAESPO sekvos, laŭ la ero VII, Artikolo 4-

a, Leĝo 9.790/99:

I – La fundamentajn principojn de Kontado kaj la Brazilajn Normojn de Kontado;

II – La publikigon en kiu ajn efika medio, je la fino de la fiska jaro, de la raportoj pri aktivaĵoj kaj la financaj raportoj de la Organizo, inkluzive de la atestoj pri kviteco ĉe INSS (la brazila nacia sistemo de socia asekuro) kaj FGTS (la nacia fonduso por garantio al laboristo okaze de maldungiĝo), disponigante tion al la ekzamenado de kiu ajn civitano;

III – La okazigon de revizio, inkluzive de sendependaj eksteraj reviziantoj, laŭ la okazo, de la aplikado de eventualaj rimedoj ricevitaj pro Partneriĝa Kontrakto, laŭ la Dekreto 3.100, el la 30-a de Junio 1999;

IV – La kalkulraportado pri ĉiuj rimedoj kaj posedaĵoj ricevitaj de publika fonto okazos laŭ la sola paragrafo de la Artikolo 70-a, de la Brazila Federacia Konstitucio.

ĈAPITRO VII – PRI LA ĜENERALAJ KAJ PORTEMPAJ DISPOZICIOJ

Art. 40-a – MONDA INTRAESPO malfondiĝos laŭ decido de Ĝenerala Asembleo tiucele kunvokita, kiam fariĝos neebla la daŭrigo de ties aktivaĵoj.

Art. 41-a – Ĉi tiu Statuto povos esti reformita kaj amendita kiam ajn, laŭ decido de la plimulto de ĉeestantaj membroj en Ĝenerala Asembleo specife kunvokita por tiu celo.

Art. 42-a – Provizora Administra Komitato kaj Provizora Revizia Konsilantaro, ambaŭ elektitaj la 12-an de Aprilo 2008 dum la Ĝenerala Fonda Asembleo de MONDA INTRAESPO, havos portempan mandaton ĝis la 31-a de Decembro 2009.

Sola Paragrafo – La balotado por postenoj de MONDA INTRAESPO estos reguligita de Elekta Regularo ellaborota kaj aprobota de la Ĝenerala Asembleo ĝis Septembro 2009.

Art. 43-a – Fondintaj membroj rajtos loĝi ekster Braziljo, en urboj sen propra oficejo de MONDA INTRAESPO, kiel escepto al la paragrafo 2-a, Artikolo 10-a de ĉi tiu Statuto.

Art. 44-a – Neantaŭviditaj okazoj estos pritraktataj de la Administra Komitato kaj ratifotaj de la Ĝenerala Asembleo.

Art. 45-a – Ĉi tiu Statuto ekvalidos la 1-an de Majo 2008.

Braziljo, la 12-an de Aprilo 2008.

FABRÍCIO RODRIGUES VALLE
Prezidanta Direktoro

YURI GHENOV
Financa Direktoro